

ESPERANTO PROVENCE

Numéro 77 - Juin 2009

4 numéros par an

Vorto de la Prezidanto

Ekde mia surpriza elektado al tiu posteno dum la jarkunveno 2008, mi strebis regroupigi la esperantistojn, kaj eĉ pli bone la grupojn ĉirkaŭ Esperanto-Provence.

Dum la kunveno 2009 en La ROQUE d'ANTHERON mi ĝojis pri la nombraj kaj novaj partoprenantoj.

Kia agrabla surprizo estis aŭdi de Renée Triolle, ke en Rodana-Alpoj, la esperantistoj orientiĝas al pli granda grupgraveco. Des pli, ĉe ni, ni bonvenigas novan grupon VILLENEUVE 04, dum José Grammatico intervenante pri grupoj, fortigis min en tiu gvidado. Do ni estas certe sur bona vojo.

Mi dankas la laborintajn samideanojn, kiuj partoprenis dum la pasinta jaro en pluraj renkontiĝoj en diversaj kluboj de Esperanto-Provence.

Dum somere, pluraj aranĝoj proponas al vi ferii en amika etoso kaj praktiki esperanton en internacia medio, lerni kun alilandaj instruantoj. Ne maltrafu la okazon.

ELECTIONS au PARLEMENT EUROPEEN

Contrairement à de nombreuses "petites listes", Europe-Démocratie-Espéranto présentait des listes dans toutes les régions; pour le Sud-est, Michel, Claudie, Philippe, Céline et les autres étaient candidats, mais se sont mobilisés pour coller les affiches, par exemple dans les Bouches-du-Rhône les espérantistes de Marseille, La Ciotat, Ceyreste, Carnoux, Aubagne, La Penne, Gémenos, Belcodène, Peypin, La Bouilladisse, Roquevaire.

Deux spots télévisés et un radio ont été diffusés, mais difficile de voter pour une liste quand on ne reçoit pas la profession de foi et qu'il faut imprimer son propre



Nuna Estraro kaj komitato

Prezidanto: **Pierre OLIVA** - Eden Parc 99 - 2772 Montée du Vieux Camp - 83330 Le CASTELET - nlpo@free.fr - 04 89 60 61 93

Vic-Prez.: **Monique PREZIOSO** - 92 Impasse Jean Moulin - 83700 SAINT-RAPHAEL - prezmoni@hotmail.com - 04 94 83 06 88

Sekretario: **Monique ARNAUD** - Ecole Les Pelloux - 05500 BENEVENT - monique.arnaud@aliceadsl.fr - 04 92 50 03 07

Help-sekretario: **Claudie DEMONGEOT** - 52 rue Anglic Grimoard - 84140 MONTFAVET - testudeto@gmail.com - 04 90 22 17 02

Kasisto: **Michel CERISAY** - 15 Place des Vents Provençaux - 13140 MIRAMAS - mcerisay@gmail.com - 04 90 17 40 88

membroj

Renée TRIOLLE - Bello Bauco - 694 chemin de la Civade Verte 13600 LA CIOTAT - triolle.renee@wanadoo.fr - 04 42 71 42 74

bulteno, staĝoj


Gilles WALLEZ - Le Fournas Esc.B - 165 av. du Fournas - 83300 DRAGUIGNAN - **representanto ĉe Esperanto-France**

L'ASSIMIL de POCHE est paru

Vient de paraître, en vente dans toutes les bonnes librairies au prix de 8,90 €.

Un cadeau simple et utile pour vos amis; la découverte de la langue internationale; une révision thématique pour les espérantistes débutants.

Rappelons que Renée Triolle est aussi l'auteur de "Espéranto-Express", paru aux éditions Le Dauphin, 12,20 €.



bulletin. Rien de très démocratique face aux grands partis, alors que l'idée est nouvelle: aider les Européens à se forger une véritable identité européenne, exiger la démocratie linguistique, proposer une solution équitable.

En région PACA, la liste EDE a obtenu 1653 voix .

Autant de sympathisants .

ESPERANTO-PROVENCE en LA ROQUE d'ANTHERON (13)

la 16an kaj 17an de majo

Invititaj de la grupo en La Roque, kiu jam brile organizis landan kongreson de Esperanto-France antaŭ kelkaj jaroj, ni planis viziti tiun belan vilaĝon dum Festo de la Ĉerizoj, sed pro eŭropaj balotoj, la dato ŝanĝiĝis, ankaŭ nia programo. Sed kiel kutime agrabla etoso, amikaj interŝanĝoj, kultura kaj kleriga programo. La staĝejo estis la somera feriejo La Baume, kie eblas tranokti en dometo, manĝi tre bone en restoracio aŭ promeni en la arbaro.

Sed ni lasu la parolvicon al partoprenintoj.

Kursoj okazis matene kaj posttagmeze, kun kafopauzoj, bonege prizorgitaj de niaj gastigantoj.

La unuagrada estis gvidata de Rose-Marie Quintin.



Kurso de Rose-Marie

«Ni ne lernis, ni kantis. Estis amuze, nun mi scias kantojn en esperanto, mi povas ludi. Tre plaĉis al mi kunkanti» *deklaris unu el la knabinoj*, kiuj ĉeestis kaj malaltigi la mezan aĝon de la partoprenantoj!

La duagradan gvidis *Nina Korĵenevskaja*, kiu komentas:

«En la grupo de la 2^a nivelo, ni estis komence kvarope, posttagmeze sesope. La nivelo de partoprenantoj estis pli alta ol kutima dua nivelo: 3 personoj el 5 estis libere parolantoj. Ni faris multajn parolekzercojn, legis kaj tradukis kelkajn diversnivelajn tekstojn, respondis al tre multaj demandoj kaj priskribis kelkajn temojn. Ĉiuj laboris ege aktive. Mi esperas, ke mia mallonga staĝo profitos al partoprenintoj.»



Kurso de Nina

Pri la 3^a grada, kiu okazis ekstere raportas *François Mimmersheim* el Villeneuve O4

«Okaze de la staĝo de La Roque mi retroviĝis ĉe la tablo de *Renée Triolle*, kiu instruis min kun kvar aliaj amikoj de la kara lingvo. La interesa kurso komenciĝas per la naskiĝo de L.L.Zamenhof, la kreinto de Esperanto kaj daŭris tra la diversaj etapoj de la mirinda laboro. La historio de lia familio emociis min kaj mi feliĉas scii, ke



Kurso de Renée

ekzistas kolekto de multaj leteroj de li. Ni legis ian pri propono de reformoj de la lingvo kaj ĝia rimedo. Ni atentis pri la homaj rajtoj kaj parolis dum pluraj minutoj pri la Interna Ideo komparebla al fajro. Ĉiu provis doni sian

propran senton kaj la kortuŝiga mesaĝo de la nepo Zaleski -Zamenhof dum la UK en Vilno ankaŭ pripensigas min. Mi povas nur diri, ke la amikeco kondukis miajn korojn dum la dezira studo. Feliĉa tago estis la staĝo.»

«Mi estas *Laurena*, mi aĝas 13 jarojn, mi lernas Esperanton en La Roque d'Anthon, *Andrée* gvidas la kursojn. Mi lernis la unuan gradon per «la aventuroj de *Johanino kaj Marko*». Oni kantas, oni ludas, oni parolas. Per kartludo ni konas multajn nomojn de bestoj, per domenoj ni lernas nomojn de sportoj kaj ludoj. La venontan jaron mi lernos per la metodo 11. Mi ŝatas lerni Esperanton. Mi facile komprenas la tekstojn.»

«Mi estas *Léa*, la fratinetino de *Laurena*. Mi lernas Esperanton. Ni iris al la staĝo en La Roque : ni kantis.»

Vespere, post la vespermanĝo *Monique Arnaud* sprite raportis pri sia vojaĝo al Aŭstralio, kie ŝi instruis dum la «somera» kurso en Sidneo. Jen rimarkoj de *Pierre Oliva* : «Mi tre ŝatis ŝian manieron raporti, ŝi ne vojaĝis al la alia parto de la mondo por fanfaroni kaj montri belajn fotojn, ŝi vizitis Nov-Kaledonion kaj Aŭstralion por kontakti ĉefe homojn, plejmulte esperantistojn. Mi komprenis, ke kiel en multaj landoj, malfacile estas reklami esperanton, sed *Monique* tre ĝojis instrui la internacian lingvon al grupo de angloparolantoj, eĉ se al la kursoj venis ankaŭ homoj el Rusio, Italio aŭ Sud-Ameriko! En tiu grandega lando, kie kunvivas ĉefe enmigrintoj, sed ankaŭ kelkaj indiĝendevenaj, esperantistoj membras en diversaj grupoj» .

Dimanĉe posttagmeze, viziton al la Muzeo de la Roque, komentas

Nicole Lafitte:

«La esperantistoj malkovris mirindaĵon: la Muzeo en La



La esperantistoj aŭskultas pasian kaj intereseĝan scienciston

Roque d'Antheron. Dank'al la donemeco de Andrée Clément kaj ŝia teamo, ni gustumis kafon en la kafejo "La tempo de Ĉerizoj" (el la nomo de la tradicia festo en La Roque d'Anthéron la 31^a de majo) kaj ĉefe ni vizitis la "Muzeon de Geologio kaj Etnografio"; ĝi entenas kaŝitajn riĉaĵojn! Dum tri horoj, sciencisto pasia kaj interesega esplorigis al ni tri cent milionojn da jaroj pri geologia aventuro en Provenco. Estas vera bilda libro kun maloftaj specimenoj pri oceano de amonitoj kaj gigantaj bestoj, seismoj kaj katastrofoj, la Provenco de petrolo; minaĵoj, akvo, energiaj riĉofontoj. Ĉu vi scias, ke nia Provenco estas la plej riĉa geologia regiono en Eŭropo? Ĉu vi scias, ke dufoje la vivo preskaŭ forigis sur nia planedo? Ĉu vi scias, ke Vaŭdanoj el Vaŭkluzo, persekutitaj de Provencanoj, rifuĝis ĉe Amerikindianoj "Kuna" en Panamo? Ĉiuj harmonie miksiĝis kaj ekrezultis man-tekst-arto : belegaj, buntaj, simbolaj foliŝtofaj tekstaĵoj "la

Molas"? Oni povas admiri ilin en la muzeo kun konkretaj restarigoj de tiu matriarka civilizo, plenrespektanta al vivo pro sia kapablo multon fari el malmultego. Ne forgesbla vizito! Ni deziras reveni. (Muzeo : 04 42 50 70 74)



la Molaj

MEMBRO-KUNVENO ,la 17an de majo 2009 .

Ĝi okazas en aparta urba salono, sed la (tro) malgranda partoprenantaro povus sidi ĉirkaŭ sola tablo, eĉ se ĉeestas reprezentantoj el Le Castelet, Miramas, Gap, La Ciotat, La Roque, Montfavet, Villeneuve, Manosque kaj senkulpiĝis homoj el Saint-Raphael.

La Prezidanto, Pierre Oliva grandlinie prezentas niajn problemojn: disigitaj homoj, memstaraj grupoj, kiuj volas resti "sendependaj", esperantistoj en diversaj lokoj, kiuj ne pretas aliĝi al la Federacio kontraŭ 5 eŭroj (problemo estas pli psikologia ol financa; ni disponas pri 231 adresoj, kun 171 kontaktoj). La Sekretario Michel Cerisay legas la agadraporton (jam aperis en la raporto de Esperanto-France antaŭ la kongreso en Troyes). Sur ekrano sekvas la financa raporto (se vi deziras legi ĝin, petu de la kasisto). La kozitoj enspezigas 463 eŭrojn dum la bulteno kostas 472. La kulturaj staĝoj (Agay, La

Ciotat) estas ekvilibrataj. Esperanto-Provence havas monon dank'al organizo de landaj kongresoj: Martigues lasis saldon de 734 eŭroj.

Pri estontaj agadoj, apud la staĝo en La Ciotat fine de novembro 2009, kaj Mediteranea Semajno en Agay de la 26a de februaro ĝis la 7a de marto 2010, planata estas prelegvojaĝo de Hungarino pri bonsaniga masaĝo de la 20a ĝis la 28a de septembro (kunordigas Monique Arnaud) Semajno pri Paco (en Sainte-Tulle 04 fine de majo, La Ciotat de la 20a ĝis la 28a de septembro) informado en lernejo pere de la ekspozicio (kiel en Gap, Manosque), partopreno en diversaj tutmondaj tagoj kune kun aliaj asocioj.

Debatenda restas la gazeto *Espéranto-Provence*: kion ĝi entenu? en kiuj lingvoj? kiu pretas kontribui? al kiuj sendi? (reagoj bonvenaj ĉe Renée Triolle)



Kelkaj membroj partoprenante la kunvenon.

INFORMADO / INFORMATION

Que savent les Provençaux sur l'espéranto ? Une enquête nationale s'est déroulée début 2009. Les questions ont été posées dans la rue, les gares, à l'occasion de rencontres spécifiques. Il est très clair que dans les villes où un groupe d'espéranto fonctionne bien ou face à un public plus sensibilisé, la connaissance de la langue internationale est plus répandue. Nous remercions les espérantistes qui se sont investis dans cette action.

Question 1 : savez-vous ce qu'est l'espéranto ? oui non

A ceux qui ont répondu "oui", on pose les questions suivantes :

Question 2 : comment en avez-vous entendu parler ? TV presse famille école autre

Question 3 : pensez-vous que l'Union Européenne devrait faire connaître l'espéranto ? oui non sans opinion

Savent : 435, ne savent pas :

418. A peu près les résultats nationaux. L'ont appris par la télévision : 38 ; certains ont des souvenirs très précis, d'autres pensent qu'ils apprennent tout par la télé ou par la radio : 42.

Famille (le grand-père ou la grand'mère, le plus souvent) : 95. Ecole (ou université mais certains peuvent citer le nom de l'instituteur qui leur en a parlé) : 94.

Autres (très variés : lecture, logo sur une voiture, aide d'un espérantiste à l'étranger, chanson, film, conférence, etc) : 48.

La question concernant le rôle de l'Union Européenne est plus contrastée : la plupart des gens ne se sont jamais posé la question. Ceux qui acceptent d'en discuter sont convaincus qu'il serait bon que les Européens sachent qu'il existe une solution équitable. Faire savoir est la première étape. Mais ils ne sont pas comptabilisés parmi les "oui".

	Question 1		Question 2					Question 3		
	oui	non	TV	presse	famille	école	autre	oui	non	Sans opinion
Marseille rue	11	21	0	2	4	2	6	9	0	0
Marseille SNCF	10	9	0	0	2	6		14	1	4
Marseille Salon Etudiant	113	150	16	25	28	31		80	14	
Marseille visiteurs salon	44	18	4	7	6	9		28	3	9
Marseille artisans	25	25	1	4	1	7		21	1	1
Marseille Festival russe	14	2	0	2	0	4		11	2	2
La Ciotat Salon Nautique	40	16	2	10	7	8		24	3	10
La Ciotat CIQ Fontsaïnte	13	3	0	3	0	4		10	0	3
Carnoux	14	1	0	0	4	1		6	0	2
Aix en Provence rue	8	15	0	0	5	2		7	1	0
Salon	9	22	0	2	3	2		7	0	1
Gap rue	24	26	1	4	1	6	12	15	3	6
Gap manif	43	7	1	6	7	7	14	22	10	10
Manosque	22	28	4	1	10	4	8	17	2	3
Manosque	17	33	4	4	5	3	3	16	1	3
Manosque	28	22	5	2	12	3	5	24	3	1

L'Union Européenne devrait faire connaître l'espéranto pour 311 personnes interrogées, soit les $\frac{3}{4}$; pour 44, c'est non, alors que 55 sont sans opinion.

Cette enquête a donné l'occasion d'informer un large public et de distribuer des documents (feuillet du Congrès de Martigues sur l'Année Internationale des langues ou calendrier de JEFO). L'accueil est généralement très bon, certains sont ravis de donner leur avis car on ne le leur demande jamais !

Estos bone daŭrigi la enketon post la eŭropaj balotoj por konstati ĉu la televid- kaj radi-mesaĝoj kaptis la atenton de la homoj.

Estonta informado

Forumoj de asocioj: ekzistas en pli kaj pli da urboj. Anoncu vin por havi budon; se ne ekzistas loka asocio, aŭ

loka anteno de nacia esperanto-asocio petu de partnara asocio ĉu vi povas aperi, disdoni materialon, afiŝi la nomon ktp.

Forumo de asocio okazos en La Ciotat la 12^{an} de septembro .

Ekspozicio: la federacio disponigas senpage la ekspozicion: ĝi konsistas el 12 paneloj pri diversaj temoj, eblas pendigi la tuton aŭ nur parton. Vizitu lernejojn, asociojn, bibliotekojn. Petu, ĉu eblos aranĝi ekspozicion. Ĉiam plej trafe estas aperi kadre de alia aranĝo, en domo de asocioj, diversaj forumoj pri homaj rajtoj, kulturo, diverseco, demokratio, paco, tutmonda ekonomio, vojaĝoj ktp. Havu imagon, trovu ligon.

Mendu la ekspozicion ĉe Monique Arnaud.

Vi certe havas talenton kaj pretas kontribui . Ni komencas per poeziaĵoj de Anita Collomb el Fréjus (83).Ili aperis sur la reto ĉe verkoj@yahogroupes.fr

Amikeco

Per amo oni naskiĝas, ĉu per amikeco?

Por amo oni vivas, ĉu por amikeco?

Amon oni esperas, ĉu amikecon ?

Pri amo oni revas, ĉu pri amikeco?

Amo povas mensogi, ne amikeco

Same kiel la Eta Princo,
Kaj ĉiuj aliaj
ne ankoraŭ konataj
el la Universo,
ni ĉiuj estas membroj
de unika familio,
eroj de unu animo.
Sed kiam ni ree ligos
ĉiujn la animerojn?...

Vi eble dubas pri via lingvaĵo ? Tie homoj pretas kontrollegi viajn tekstojn . Vizitu ilin :

la-bona-teksto@yahogroups.com

NE KROKODILU !

Tipa figuro de la esperanto-movado estas krokodilo, ĉar ĝi estas verda evidente, kaj vivas en diversaj partoj de la mondo. Ĉu vi scias, kie aperis la unua krokodilo?

Laŭ dokumentoj de Cherpillod, Masson, Golden, Heroldo de Esperanto kaj diversaj fontoj, ŝajnas, ke italdevena frizisto Emilo Ferrari inventis la vorton, konsiderante, ke sovaĝulo estas «krokodilo» . Do homo parolante sian lingvon dum esperanto-aranĝo kondukas sin kiel sovaĝulon, do krokodilon. Se la vorto aperis antaŭ la dua mondmilito en Parizo, ĝi larĝskale populariĝis dum la IJK en Avinjono (1957) inter la membroj de TEJO. Aperis *krokodili*, *krokadilado*, *krokodilema*, ktp, sed ankaŭ tuta listo de samtipaj bestoj. Vi *krokodilas*, kiam vi parolas vian lingvon dum esperanto-aranĝo (Franco parolas france kun Franco); vi *aligatoras* se vi parolas angle kun Italo. Vi *kajmanas*, kiam vi parolas alian lingvon ol tiun de la loĝlando: ekz angle en Japanio, aŭ france en Usono! Vi *gavialas*, kiam vi parolas lingvon ne komprenantan de la ĉeestantoj (ekz vi parolas esperanton ĉe UNESKO), kaj laste aperis *lacerti*: paroli sian gepatran lingvon (sub emocio, kolero) senkonsideri, ĉu la aliaj komprenas.

Renée Triolle dankas José Grammatico pro lia kontribuo.

CE N'EST PAS MOI QUI LE DIT

Recueil d'opinions raisonnées sur la langue Internationale ESPERANTO.

Raymond BORE , Chambéry 2009, réédité à l'occasion des Elections Européennes du 7 juin 2009

Tiun kompiladon faris Raymond Boré, delegito de UEA en Chambéry . La unua versio aperigas opiniojn de famuloj

DEKMINUTA FILMĴURNALO EKIS

Malgraŭ la malfacilaĵoj, kiujn trafis la unua provo de televido en esperanto, Universala Esperanto-Asocio aperigas ekde la mezo de majo retan kinejon .

Vizitu ĝin,rigardu, diskonigu, kontribuu (per mono aŭ filmoj)

"UEA viva" troviĝas en: <http://www.youtube.com/UEAviva> .

La reta kinejo troviĝas en:

<http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>

KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO

Kvankam neniu, kiu konas nek la islandan nek la mongolan lingvojn, kuraĝus aserti, ke ne ekzistas islanda aŭ mongola kulturo, tiu argumento pri senkultureco de esperanto estas kutima konkludo de nesciantoj. Sed praktikantoj de la internacia lingvo bone scias, ke estas eldonitaj libroj (averaĝe unu ĉiun tagon), ke eblas kanti en esperanto (Patricia Kaas proponis esperanto-version de la kanto, kiun ŝi proponis por Eŭrovizion, ni ĝuis koncerton en nia regiono de Argentina Alejandro Cossavella, dum la landa kongreso en Troyes, aperis hip-hopo pariza grupo en esperanto) kaj okaze de esperanto-aranĝo nepras kultura parto. Sed por ĝui nur esperanto-kulturon, vizitu KEF (Kulturan Esperanto-Festivalon) en Danlando, en la urbo de la kastelo de Hamleto (la verkon de Shakespeare tradukis Zamenhof mem, bona okazo relegi ĝin en tiu jubilea jaro!)

de la 7^a ĝis la 12^a de julio.

www.kef.saluton.dk

MI LEGAS DO MI ESTAS

Eĉ se vi ne pretas trapasi la 3^a gradan ekzamenon de FEI, legu la librojn kaj plibonigu vian lingvo-nivelon:

«La kosmo kaj ni» (galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo) de David Galadi-Enriquez kaj Amri Wandel, eld.FEL 2005; 222 paĝa; 2parta. La unua traktas la astronomian prezenton de la galaksioj, la dua estas pli filozofia pri la serĉado de ekstertera inteligenteco aŭ vivo ekster la tero.

«Vivo de Lanti» de E.Borsboom, eld SAT 1976 pri la vivo de Eugène Adam, «l'anti» (konstraŭlo) de ĉio, kiu fondis SAT 255 paĝa.

Bela romano estas

«Ombro sur interna pejzaĝo» de Spomenka Stimec, eld; Edistudio 1984: amo kaj disiĝo en esperanto-medio 141 paĝa

«La foto-albumo» unua volumo de Trevor Steele, eld IEM 2001 estas tuta sagao de katolika irlanddevena familio en Aŭstralio. Galerio de diversaj portretoj en 366 paĝoj.

(sciencistoj, verkistoj, politikistoj): unu plena paĝo A4 estas dediĉita al unuopa citaĵo . La nuna verko estas pli modesta broŝuro A5 sed legeblas 199 diversaj opinioj .

Bona argumentaro por la skeptikuloj .

Vidu « europe2009.fr » aŭ « e-d-e.org »

PROVENCAJ ESPERANTISTOJ AGAS

Kvinope el Provenco al la Landa Kongreso en Troyes: le Congrès de l'Espéranto en France s'est tenu à Troyes, en Champagne du 7 au 11 mai. Cinq Provençaux y participaient, tous très actifs: citons Philippe Chavignon autour des "Dialogues autochtones «Indiĝenaj dialogoj» qui tend à réunir les indigènes, soumis aux langues nationales plus puissantes et leur fournir le médium d'une langue commune (l'espéranto) et de l'outil informatique. Depuis plusieurs années Philippe organise des voyages au Guatemala pour un tourisme équitable, illustré par des photos des lieux et des gens. Prochain voyage en décembre 2010.

Monique Arnaud, trésorière du groupe des Enseignants Espérantophones. GEE est de plus en plus sollicité pour des programmes internationaux d'enseignement de l'espéranto comme moyen propédeutique pour apprendre plus vite d'autres langues vivantes et découvrir l'interculturalité. Malheureusement, les enseignants d'espéranto en France sont souvent retraités!

Renée Triolle remplaçait Gilles Wallez, empêché, au CA d'Espéranto-France, elle est intervenue plusieurs fois lors de l'Assemblée Générale.

L'Espéranto au Mouvement de la Paix à Sainte-Tulle (04)

A l'origine de l'espéranto, il y a l'idée d'un jeune adolescent: «si les gens se comprenaient, ils se parleraient avant de se taper dessus». L'espéranto est depuis toujours lié à la notion de Paix, et rien d'étonnant à ce que Universal Esperanto-Asocio et le Mouvement de la Paix soient tous deux engagés pour le Manifeste 2000 de l'UNESCO pour la Paix et la Non-violence en faveur des enfants du monde. Si depuis des années, des espérantistes sont actifs au sein du Mouvement de la Paix, c'est sans doute la première fois que l'idée d'espéranto ne se heurte pas à un mur d'incompréhension. En effet lors de la Manifestation à Strasbourg contre l'OTAN, les pacifistes venus de plusieurs pays européens ont été vigoureusement repoussés et auraient aimé échanger entre eux... «mais, impossible, on ne se comprenait pas». A Sainte-Tulle, Nicole Lafitte et Pierre Oliva ont retrouvé des espérantistes de Dordogne ou de Bretagne alors que le «régional» José Grammatico faisait circuler la superbe affiche de «Paix» en différentes langues et que le groupe de Martigues avait édité des sets de table avec «Paix» en différentes langues.



Komitataj atelieroj de la

Gapanino en la Brita Kongreso en Salisbury

«Oh to be in England, now that april is there», sopiris la poeto Robert Browning. Ankaŭ mi sopiris viziti Anglion, kiam mi legis pri tiu kongreso en Salisbury.

Dum multaj jaroj mi kutimis viziti tiun regionon kun miaj gelernatoj, ĉiam printempe. Tre proksime de la katedralo, en Sarum College-fama teologia centro-okazis la kongreso kun partopreno de sep dekoj da homoj.

Prelego pri arkitektoj de la katedralo, pri Georges Herbert, pri Esterikso, pri Waringhien, pri la novelo de Thomas Hardy-Jude the Obscure-Paul Gubbins sukcesis kuraĝigi homojn legi aŭ relegi tiun libron, John Wells prelegis pri la frazmelodio, en Interna perspektivo... Teatraĵe, emocie, Marjorie Boulton rakontis al ni la infanecon de L.L.Zamenhof. Ni malkovris «kvin» Sally pro la ludo de kvin homoj en la «Sonĝo de la Kursgvidanto» de Marjorie Boulton, proponita kiel kandidato al la Nobel-premio pri Literaturo.

Lunde bela ekskurso al la preĝejo de G.Herbert, al Old Sarum kaj al Avebury Ring. Do mi estis en Anglio dum aprilo!

Monique Arnaud



Marjorie Boulton & Monique Arnaud

Ni praktiku la lingvon

En Aix, la grupo ne povas regule kunveni, sed iniciatis diversajn aranĝojn: «literatura kafejo» okazas pli malpli ĉiumonate. La 29^{an} de majo okazis prelegeto pri «Praktikado de la nuna latino». Latina lingvo restas la oficiala lingvo de la katolika eklezio kaj de la internaciaj nomoj rilate al flaŭro kaj faŭno eĉ se granda premo de angloparolantoj puŝas al uzo de la anglaj terminoj.

En Marseille, la 9^{an} de junio, komuna vizito de la ekspozicio pri arabaj sciencoj, kie eblis vidi, spekti aŭ komenti diversajn filmetojn, tekstojn aŭ objektojn pri astronomio, matematiko, skriboarto. Rimarkinde estas, ke en iu epoko, la Araboj ĉerpis el la tekstoj de Ĉinoj, Grekoj, Hindoj kaj konsideris, ke legado kaj klerigo estas motoj.

Esperantistoj povas legi pri la temo la jenon: La Nobla Korano eld TK 1970, «Je la flanko de la profeto» TK 1978 «lirikaj Perloj de Al Andalus» fundacion Esperanto 1995;

«La libro de la Mirindaĵoj» de Marco Polo, tradukita de Daniel Moirand, UEA 2001

En Marseille, la 14^{an} de junio: regiona ekzamensesio kun tro malmultaj kuraĝuloj. Ni esperu, ke venontjare instruistoj kuraĝigos siajn lernantojn trapasi la oficialajn ekzamenojn de FEI.

Réinsertion et Espéranto
Chez Mraihy Zohra
3 place Watteau
30900 Nîmes
tel :06.16.46.64.52
reinsertionetesperanto@gmail.com

Nîmes, le 25 mai 2009

Chèr(e) adhérent(e) et généreux(se) donateur(rice),

L'association Réinsertion et Espéranto poursuit son action avec une nouvelle équipe dont voici les noms : Mme Demongeot Claudie (présidente), Mr Allandrieu Robert (trésorier), Mr Schneider Jean-Pierre (secrétaire et gestionnaire du Libro-servo).

Zohra Mraihy est salariée de l'association depuis 2000 et fait un travail remarquable aussi bien en matière du développement de l'espéranto que dans le domaine du soutien scolaire auprès d'enfants. Son emploi, qui est un contrat de type « emploi jeune » n'est plus depuis février 2009. Il nous faut donc trouver 2 100 € par mois pour financer son salaire charges comprises. Les dons sont les bienvenus. Nous vous en remercions par avance. Vous pouvez nous aider par divers moyens :

- faire un don mensuel (par chèque, virement, prélèvement ou paypal),
- participer à nos stages ou nos cours,
- acheter du matériel pédagogique, des livres, des tee-shirts...
- parler de notre action en faveur de l'espéranto.

Nous sommes dans une nouvelle dynamique, qui consiste à rétablir les liens avec les diverses associations de la région. A présent membre de la fédération Languedoc-Roussillon, nous avons participé à sa dernière assemblée générale (à Lezignan-Corbières le 18 avril 2009). Nous avons organisé les examens d'espéranto des 1^{er} et 2^{ème} degrés lors du stage de Sète, fin août 2008. Nous y avons également proposé notre libroservo.

Nous envisageons de nous orienter vers l'édition. Bientôt paraîtra : « Exerçons-nous ! » : Ce manuel vous permettra d'évaluer et d'approfondir vos connaissances à l'aide d'exercices et leur corrigé.

Vous souhaitez devenir membre de l'association Réinsertion et Espéranto ou nous soutenir : Contactez-nous

Les personnes souhaitant recevoir nos informations par courriel sont invitées à nous faire parvenir leur adresse Internet.

Nous restons à votre disposition pour plus d'informations et vous remercions de la confiance que vous nous témoignez.

Pour l'association, Claudie Demongeot, Présidente

.....
Je soussigné, Nom :Prénom :

Adresse :

.....

souhaite : faire un don à l'ordre de Réinsertion et Esperanto
faire un prélèvement mensuel sur ccp n°6212 27 T centre de Montpellier
payer ma cotisation annuelle (20€)

Niaj rendezuoj

- * **Agay** (apud Saint-Raphael) 28^an de junio: finjara tagmanĝo en Le Renouveau 16 eŭroj; amika post-tagmezo - prezmoni@hotmail.com
 - * La Roque d'Antheron (13): Internacia Festivalo pri pianludado. Ludos rusa esperantisto Andrej Korobejnikov, 24an de julio kaj 14an de aŭgusto
 - * **Bouresse** (86) koncerto en esperanto, koncerto de Theodorakis kaj Pablo Neruda la 12an de julio - leveque.franjo@gmail.com
- Por lerni, praktiki en internacia etoso kaj ferii. Pli da informoj ĉe Renée Triolle*
- ⇒ **Grésillon**, Maison Culturelle d'Espéranto(49) semajnaj staĝoj ekde la 4a de julio / <http://gresillon.org> — kastelo@gresillon.org
 - ⇒ **Bouresse** (86) en Kvinpetalo, kvintagajaj staĝoj ek de la 7a de julio - www.kvinpetalo.org - informoj@kvinpetalo.org
- * **Jünkerath** (Germanio) 1-8 aŭgusto - www.esperantoland.org/somere
 - * Plouezec (22) 15-22 aŭgusto - www.babelo.org
 - ⇒ Sète(34) 22-29 aŭgusto <http://perso.orange.fr/nikolao/esperanto.html> : jf.passarella@free.fr

Internaciaj kongresoj aŭ konferencoj

- * **UK en Bjalistoko** (PL) 25 julio-1 aŭgusto - www.uea.org aŭ info@esperanto-france.org
- * **ILEI** konferenco en Krakovo(PL) 17-25 julio ilei.info/konferenco/aliĝilo2009.php
- * **Cassino**(IT) itala kongreso 28 aŭgusto-3 septembro - kongreso@esperantoitalia

Atentu !!! ... Lastan minuton !!! ... Atentu !!! ... Lastan minuton !!! ... Atentu !!!

La Ciotat (13) : L'espéranto en vacances - le 10 juillet à 19h, Grand Portique, 18 rue Vignol.

Info : Renée Triolle 04 42 71 42 74